

Kramerius, Brno – Typo Rossmann



BRNO



EKSPOZICIO DE L' SAMTEMPA KULTURO EN ĈEĤOSLOVAKIO

1928

26. V. – 30. IX.

BRNO



Katedralo Petrov

kiel centro de Moravio estas por alveninto bona elirejo por ekskursoj.

1.

al lokoj etnografie rimarkindaj, en kiuj homo neinformita ekvidos ankoraŭ nune en taga vivo antikvajn popolkostumojn: a) dum veturo per vagonaro al Bratislava ĉiu vizitos Lanžhot, aŭ b) dum veturo per vagonaro al Vlára, Kyjov kaj proksiman Velká.

2.

Al antikvaj lokoj aŭ malnovaj kasteloj kiuj same eminentas per belegaj memorindâjoj arhitekturaj: al Pernštýn ĉe fervojo Brno – Německý Brod kaj per la sama fervojo al Tišnov kaj apuda Předklášteří; al Třebíč per vagonaro Brno – Jihlava, al Znojmo, Vranov, Bítov, kiuj kuŝas sur bela turista [illegible]o ĉe rivero Dyje. Ĉarmaj estas ankaŭ ekskursoj al Kroměříž, riĉa je konstruajoj kaj bela galerio, al Hodonín kun Domo de moraviaj artistoj, aŭ en proksiman Rajhrad (: de Brno en duono da horo vagonare atingebla :) kun riĉa kaj antikva benediktana biblioteko.



Kastelo Špilberk

3.

Proksime de Brno, (direkto per vagonaro al Praha), kun elirejo el Blansko etendiĝas interesa Moravia Karsto kaj en ĝi belegaj stalaktitaj grotoj kun abismo Macoha, ne malproksime de ili grotoj en Sloup.



Placo Nám.Svobody

4.

El Brno oni povas facile viziti fame konatan banlokon Luhačovice (: tuttaga ekskurso :), Trenčianské Teplice aŭ Piešťany kaj aliajn malpli grandajn banlokojn.

5.

De ĉi tie tiuj, kiuj interesiĝas pri industrio, povas ankaŭ en tuttaga ekskurso trarigardi moravi-ostravan karbbasenon kun ĝia grandioza ferindustrio.



Urba teatro

6.

Amikoj de arĥeologio povas el Brno ankaŭ en unutaga ekskurso ekvidi interesegajn arĥeologiajn kaj paleontologiajn troviĝejojn ekzemple en Předměstí apud Přerov (nordoriente) aŭ Věstonice (sudokcidente).

7.

Fine, kiu okupas sin pri patrolandscienco, povas de Brno veturi eĉ dum unu tago al Bratislava kaj trarigardi proksiman memorindan Děvín.



Pavilono de l' B.V.T.



Pavilono de l' lando Moravio



Panoramo de l' ekspozicia turo de B.V.T.

Brno

havas en ĉi tiu jaro ekspozicion de nova speco. Je memoro de deka jubileo de reatingita libereco de respubliko ĉeĥoslovaka, sub protekto de prezidanto T. G. M a s a r y k kaj honora prezidanteco de l'registaro aranĝas speciala al tiu celo starigita komitato kun helpo de l' ŝtato, lando Moravio, urbo Brno, universitato de Masaryk kaj aliaj ĉeĥoslovakaj altlernejoj, Komerca kaj metia ĉambro kun Svaz Čs. Díla kaj societo Werkbund der Deutschen en Liberec, Instituto por florstatigo de metioj, Nacia teatro en Brno, Muzika konservatorio de Brno kaj Ekspozicia foiro de Brno

Ekspozicion de l' samtempa kulturo e[illegible] Ĉeĥoslovakio.

Per ĉi tiu ekspozicio estas prezentita bildo de kultura progreso de Ĉeĥoslovakio de post ĝia memstarigo. La ekspozicio estas lokita sur surfaco de 30 hektaroj, kiu estas aranĝita lau samtempaj postuloj ekspoziciaj. Granda ekspozicia pavilono, kies areo estas 16.000 kvadrataj metroj, estas centro kaj ĉirkaŭ ĝi 15 aliaj pavilonoj. La areo de ĉiuj ekspozic ejoj superas 30.000 kvadrat. m., sed krom ĉi tiuj ejoj konstruis al si ankaŭ aliaj entreprenoj kaj firmaoj siajn specia'ajn pavilonojn kaj krom tio kompreneble estas en la ekspoziciejo restoracioj, amuzejoj k. s. El la citita estas evidente, ke ĉefa ekspozicia objekto estas plej granda tiuspeca ekspozicia palaco en Eŭropo.



PLANO DE L' TUTA EKSPOZICIEJO

La ekspozicio havas ĉi tiujn fakojn:

A Lernejaro:

a) porinfaneta kaj elementa,
b) mezlernejoj kaj pedagogiaj institutoj,
c) faklernejoj.

Fako por scienco, spirita kaj teknika kulturo kaj altlernejoj.

B Homo kaj naturo vivanta:

1. Homo kaj lia generacio.
2. Homo kaj lia sano.
3. Ŝirmo de la homa sano.
4. Psikologio kaj psikotekniko.
5. Ekspluato de viva naturo.
6. Ekkono de viva naturo. Biologio.
7. Zorgo pri naturaj memorindajoj.
8. Botanika gardeno. Elektra bieno.

C Homo kaj naturo senviva:

9. Universo kaj Tero.
10. Fiziko, kemio, matematiko.
11. Produktado kaj teknika esplorado.
12. Rilato de la homo al spaco kaj tempo.

D Juro kaj ŝtato:

13. Administraj kaj ŝtataj sciencoj.

E Spirita vivo de l' homo:

14. Sociologio.
15. Lingvistiko. Dialektoj. Literaturo.
16. Ĵurnalistiko.
17. Historio. Muzeoj. Arĥivoj. Zorgo pri kulturaj memorajoj kaj de la hejmo.
18. Belartoj. Muziko. Teatro.
19. Popoledukado. Kulturaj societoj. Sciencaj societoj. Bibliotekoj.
20. Altlernejoj.
21. Legianoj. Ĉeĥoslovaka kulturo ekster limoj. Ĉeĥoslovakaj sciencaj vojaĝantoj.

En kadro de ĉi tiu parto estas realigita je iniciato de Elektroteknika ligo ĉeĥoslovaka kaj kunhelpo de Ĉeha fako de landa agrikultura konsilantaro en Brno kaj aliaj agrikulturaj faktoroj ekonomia bieno, ekipita el teknika vidpunkto per ĉiuj ekzistantaj havigeblaj modernaj rimedoj. Titolo „Elektra bieno" esprimas en kiu direkto superos teknikaj kaj ekonomiaj aranĝoj.

Arto.

Ĉi tiu fako prezentas en unueca instalo laboron de ĉeĥoslovakaj artistoj, asociigitaj en soĉietojn laŭ landoj kaj naciecoj, el lastaj 10 jaroj. Ci tiu ekspozicio enhavas bildojn, plastikon kaj arhitekturon. Tiu ĉi lasta speco de artistproduktado konvene kreos transiron al ekspozicio konstrua en respubliko ĉeĥoslovaka entute.

Artmetio.

Artmetian fakon en Ekspozicio de l'samtempa kulturo organizas Svaz Čs. Díla. Programo de ĉi tiu fako estas: Uzita arto en loĝejo kaj vivo de moderna homo. Ĝi ne estas nura ekspozicio de belaj artmetiaj laboroj, sed ĝi prezentas en amaso da mendaĵoj perfekte aranĝitan loĝejon laŭ efektivaj bezonoj de la [illegible]tempo kaj vivo, kolektas modelajn solvojn de [illegible]naj taskoj de nova uzita arto, ĉion en konsento kun celtrafo, kvalito de materialo kaj produktado eĉ kun spirito de demokrata societo. Loĝeja fako de Svaz estas atesto kaj resumo de atingitaj rezultoj kaj tial koncentrigas sen diferencoj ĉiujn artistojn, proponantojn kaj produktantojn, kiuj valore laboras en nia industrio.

Pliajn fakojn artmetiajn kreas: vitro, teksaĵoj, juveloj, keramiko, altvalora metalo kaj bijuterio, ŝtono, libro, preso kaj reprodukto, ludiloj, enlanda produktado, ankaŭ fakoj teatraj kaj pormodaj.

Ĉi tiu fako estas kompletigita per speciala ekspozicio de Instituto por florstatigo de metioj kaj tombara arto.

BVT

Ekspoziciaj foiroj de Brno.

[illegible]n kadro de tutŝtata Ekspozicio de l'samtempa kulturo en Ĉeĥoslovakio, aranĝata en Brno en 1928 okazos de la 26a de majo ĝis la 30a de septembro 1928 Ekspoziciaj foiroj de Brno.

En Ekspoziciaj foiroj de Brno estas reprezentataj ĉi tiuj fakoj:

1. metalurgio,
2. lignoindustrio kaj ludiloj,
3. vitroindustrio, keramiko, porcelano,
4. artmetio,
5. elektrotekniko,
6. mehaniko, optiko,
7. (juvelindustrio), juvelarto, oraĵarto, horloĝmetio,
8. agrikulturo kaj ĝardenkulturo,
9. arbarkulturo kaj semoj,
10. nutraĵoj,
11. teksa kaj vesta industrio,
12. ledaĵoj,
13. galanteriaĵoj,
14. grafiko,
15. papero, lernej- kaj kontorbezonaĵoj,
16. muzikinstrumentoj,
17. radioaparatoj, akcesoraĵoj,
18. bicikloj, motorcikloj kaj aliaj veturiloj,
19. konstruaĵoj kaj konstruindustrio,
20. grupo por diversaĵoj.